

La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

EL LA ENHAVO

Jarkongreso en Västerås 32

Rusaj radioj 33

SEF-Jarraporto 34

Ideologiaj ŝanĝoj en
la Esperantomovado 36

Miriam Lion:
Universala lingvo 39

Diskutoj 40

Tra Azio 41

Abono 20 sv. kr.

Postĝiro: SEF 20 12-3

3

1972

60-a jaro



La granda teatro de Moskvo. Vidu la artikolon
de E. Rytenberg en tiu ĉi numero.

Tiu ĉi numero estas la lasta antaŭ la somera libertempo; la sekvonta numero aperos en aŭgusto.

Intertempe okazos multaj aranĝoj. I. a. la Jarkongreso en Västerås. Vi povas verŝajne ankoraŭ allĝi, se vi ne jam faris tion. Sed estas vere en "la lasta minuto". Tuj ekagu!

En Västerås oni diskutos i. a. pri komuna nordlanda gazeto kiu anstataŭigu la nunajn landajn esperantogazetojn. Tio estas ja gravega demando. Ni surpriziĝis, ke ŝajne preskaŭ neniu reagis pro la artikoloj de Franko Luin kaj la redaktoro en la antaŭa numero. Se vi havas intereson por la afero, vi devas konigi vian opinion je la jarkongreso aŭ al la reprezentantoj, kiuj ĉeestos tie.


De tempo al tempo ni ricevas de niaj legantoj sugestojn kaj kritikojn pri la enhavo de La Espero. Tio ĝojigas nin, ĉar tio montras, ke vi legas nian gazeton kaj havas intereson por ĝi.

Kritiko, kiu kelkfoje aŭdiĝas, estas ke la enhavo estas tro altnivela. Tro da poezio kaj da literaturaĵoj kaj artikoloj lingve malfacilaj. Certgrade oni eble pravos, sed kie trovi la materialon kun tekstoj pli simplaj? Ni devas publikigi kion oni sendas al ni, kaj estas VI, la legantoj, kiuj kune kun ni kreas la gazeton. Ĉu sveda, ĉu nordlanda gazeto, tiu problemo restos la sama.

En tiu ĉi numero vi tamen trovos sufiĉe multe da facila teksto. La artikolo de Osvald Nicolaisen pri lia vojaĝo tra Azio estas tre facila kaj tamen interesa, kaj facilan lingvon uzas ankaŭ Rytenberg en Rusaj Radioj.

Iom pli "malfacila" eble estas la artikolo pri Ideologiaj ŝanĝoj, reprezita el Kontakto, kaj kies duan kaj finan parton vi trovos en tiu ĉi numero. Tiu science farita esploro estas tamen tre interesa kaj utila por ĉiuj, kiuj volas kompreni la diskutojn kaj tendencojn en nia movado. Kunlige kun tiu artikolo legu tiun de S. A. Jacobson pri "nacio esperana". Utopio? Mi ne scias. Sed ne forgesu, ke nia lingvo mem estas kuraĝa ideo de kuraĝa homo.

Ni deziras al niaj legantoj agrablan someron!



MAJO-JUNIO 1972

Numero 3. 60-a jaro

Verksamhetsberättelse 1971

Under våren 1972 är en ny upplaga av den svenska Esperantonyceln, den 20:e, under tryckning. Docent Ebbe Vilborg beräknar att manuskriptet till den nya Svensk-Esperantiska ordboken skall vara tryckfärdigt vid höstterminens början 1972 och det är styrelsens avsikt att komma igång med sättningen så snart som möjligt därefter.

Omsättningen har uppgått till 29.454 kr., vilket utgör en ökning.

Enär vinsten är för liten att medge utdelning, föreslår styrelsen att den föres i ny räkning.

Förlagets expedition har under året föreståtts av fru Anna-Greta Strönne.

Styrelsen har under året hållit ett protokollfört sammanträde. Styrelsen har bestått av Tiberio Morariu, Sven Sjöblom, Karin Strandberg och Per Törnégren med Sven Sjöblom som ordförande. Styrelsesuppleanter har varit Bertil Nilsson och Nils Olsson. I tur att avgå är Tiberio Morariu, Per Törnégren och Nils Olsson.

Ekonomisk rapport för år 1971

BALANSRÄKNING

Tillgångar:	1/1 1971	31/12 1971
Omsättningstillgångar		
Kassa	0	0
Postgiro	4.773: 90	4.752: 66
Bank	31.631: 86	39.672: 32
Kundfordringar	5.237: 44	5.789: 64
Varulager	17.064: 82	10.165: 80
Kommissionslager	1.053: 44	753: 92
Anläggningstillgångar		
Andelar i HSB	1.495: 70	1.495: 70
Inventarier	0	0
Summa	61.257: 16	62.630: 04
Skulder och eget kapital:		
Skulder		
Långfristiga skulder ..	6.281: —	6.278: —
Diverse leverantörer ...	15.285: 57	15.562: 09
Skatter o. avg. (moms)	0	450: 10
Eget kapital		
Andelskapital	32.740: —	32.740: —
Reservfond	6.509: 60	6.509: 60
Balanserad vinst	390: 81	440: 99
Årets resultat	+ 50: 18	440: 99 + 649: 26
Summa	61.257: 16	62.630: 04

VINST- OCH FÖRLUSTRÄKNING FÖR ÅR 1971

Intäkter:	
Bruttovinst	9.636: 13
Ränteintäkter	2.064: 80
Summa	11.700: 93
Kostnader:	
Omkostnader	11.051: 67
Årets vinst	649: 26
Summa	11.700: 93

Malmö den 15 mars 1972.

Sven Sjöblom

Karin Strandberg

Per Törnégren

MALKOVRITA SEKRETO



Ake Blomberg

Malfrue, jes, sed pro bonege kaŝita sekreto ni povas nur hodiaŭ prezenti nian omaĝon al la redaktoro de La Espero, Ake Blomberg. Li atingis jam la 25-an de februaro sian 50-an jaron kaj sukcesis lerte kaŝi tiun ĉefnovajon por sia legantaro. Ĉar ni, liaj kunlaborantoj, ne havis la plej etan imagon pri tio, ke li tiom juna jam povus atingi tian respektindan aĝon, ni maltrafis la eblecon informi lian amikaron pri la jubileo.

Vi ĉiuj bone scias pri lia multjara agado por esperanto kaj por la movado. Jam en 1939 li estis unu el la fondintoj de la esperantoklubo en Lidköping, lia naskiĝurbo. Depost 1940 li estas ĝia prezidanto. Dum la lastaj 15 jaroj li krome prezidis la jarkunvenojn de SEF kaj en liberaj horoj redaktis La Esperon ek de 1970. Pro tiuj meritoj kaj pro lia ĉiama preteco helpi kaj konsili ni kaptas ĉi tiun okazon laŭre kroni tiun persisteman laboranton — nur bedaŭrante ke niaj bondeziresprimoj venas iom post festo.

Ni esperas ke vi Ake ankorau dum multaj jaroj restos same fervora batalanto-redaktanto-prezidanto kiel ĝis nun.

Sam

Å R S M Ö T E

Härmed kallas andelsägarna i

**FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO U. P. A.**

till ordinarie årsmöte

söndagen den 21 maj 1972
kl. 16.00

på Stadshotellet, Västerås.

Ombud för andelsägande förening skall inlämna fullmakt före årsmötets början. Ärenden enligt stadgarna § 14.

Styrelsen

FROSTAVALLEN

30 juli — 6 augusti



La prelegsemajno de Frostavallen nun distribuis la pretan programon, kiu informas, ke sub la ĉeftemaro de

LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO EN LA MODERNA MONDO

— Kun speciala atento al la situacio en Eŭropo.

troviĝas multaj, tre interesaj prelegoj:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, London, Britujo:

- Enkonduka raporto
- Pozicio de lingvoj en internaciaj organizaĵoj
- Pozicio kaj aspiroj de la rusa lingvo
- Jugoslavio: Ekzemplo de solvo de interna lingva problemo

D-ro W. Bormann, Hamburg, Germanujo:

- La germana kiel nacia lingvo
- La germana kiel fremda lingvo
- Lingvaj reguloj en eŭropaj unuiĝoj

D-ro J. C. Wells, London, Britujo:

- La angla kiel gepatra lingvo
- La angla kiel fremda aŭ dua lingvo
- La minoritatoj en Britujo kaj Irlando

S-ro J. Thierry, Paris, Francujo:

- La franca lingvo kiel denaska aŭ familia
- La franca lingvo kiel komuna aŭ dua
- La lingvaj minoritatoj en Francujo

D-ro K. Söderberg, Uppsala, Svedujo:

- La instruado de fremdaj lingvoj en Svedujo: Avantaĝoj kaj danĝeroj

Ekster la oficiala kadro okazos diskutado pri la temo: PERSPEKTIVOJ DE ESPERANTO KAJ VOJOJ POR LA ESTONTA AGADO — Ĉu la nuna laborprogramo estas adekvata?

Informon pri kaj aligilon por la prelegsemajno vi povas ricevi ĉe: S-ro Jan Ströenne, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo.

Ni rekomendas al vi tuj aliĝi al la vere interesa aranĝo en tre ĉarma naturo.

BONVENON

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

Guu du-semajnan libertempon en Esperantujo! Aligu al:

Internaciaj feriaj Esperantokursoj en Helsingör 23—30 de julio

Sveda Somera Semajno en Frostavallen 30 de julio—6 de aŭgusto!



VÄSTERÅS

PINGSTAFTON

- 15.00 Kongressbyrån i Stadshotellet öppnas.
 17.00 SEF-styrelsen sammanträder.
 17.00—19.00 Länsmuséet på Slottet öppet för SEF:s medlemmar.
 19.00 Kongressen öppnas i Rikssalen på Slottet.
 20.00 Supé på Stadshotellet.

PINGSTDAGEN

- 9.00—11.00 Arsmötesförhandlingar.
 11.00—12.00 Diskussion om gemensam nordisk tidning.
 12.00 Lunch.
 14.00—15.00 "Efika Informado", föredrag av Ib Schleicher från Danmark.
 15.00—17.00 Gruppdiskussion kring samma ämne.
 16.00 Förlaget sammanträder. Facksammanträden.
 19.00 Tesupé med uppträdande från olika klubbar.

ANNANDAGEN

- 9.00 Gudstjänst ordnad av KELI. Se särskild information.
 10.30 Rapport från gruppdiskussionen.
 12.00 Kaffe på Djäkneberget. Kongressen avslutas.

ANMÄLNINGAR

kan göras direkt till Svenska Esperanto-Förbundet, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.

Det går också att ringa 08-37 27 00 (dagtid) eller 08-52 76 67 (kvälltid), Ragnar Hjorth.

Hotellrum kan inte längre garanteras.

PRISER

Deltagaravgift 25:—
 „ (SEJU-medlem) 10:—

Kongresspaket, innefattande 2 övernattningar på Stadshotellet, frukost 2 dagar, supé pingstafton, lunch och the-supé pingstdagen:

dubbelrum, per person .. 134:—
 enkelrum 154:—

För dem som inte önskar kongresspaketet kostar:

dubbelrum, per natt och person 30:—
 enkelrum, per natt 40:—
 frukost 6:50
 supé pingstafton 25:—
 lunch pingstdagen 21:—
 the-supé pingstdagen .. 15:—

Kongressens postgiro är 50 74 61-2 Esperantokongressen

Adressen är Svenska Esperanto-Förbundet Jungfrugatan 30 114 44 Stockholm

TRIOBLA AŬSPICIO

Tri aranĝoj en Eŭropo en la somero de 1972 ĝuos la aŭspicion de Universala Esperanto-Asocio: Somera Esperanto-Universitato de Gyula (Hungarujo), Hungara Kultur-Festivalo en Budapeŝto kaj Sveda Somera Semajno en Frostavallen. La datoj de tiuj aranĝoj estas tiaj, ke eĉ estus eble partopreni ĉiujn tri — kaj la programoj certe invitas fari tion!

La Somera Esperanto-Universitato en Gyula estas jam la deka, do jubilea, en serio, kiu konatigis internacie pro sia alta nivelo. Inter la 9a kaj 15a de julio, prelegantoj diversnaciaj pritraktos plej variajn temojn — de Shakespeare ĝis gastronomio. Prospekton sendas SEU, TIT, 48-as u. II, Gyula, Hungarujo.

Tuj sekvos la Hungara Kultur-Festivalo en Budapeŝto, de la 17a ĝis la 23a de julio. La programkajero, ricevebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio (Budapest 5, Pf 193), anoncas abundan regalon per eroj muzikaj, belartaj, literaturaj, filmaj, teatraj, ktp. — krom ekskursoj, fakaj kunsidoj k. a.

Pri la Sveda Somera Semajno en Frostavallen vi povas legi aliloke en tiu ĉi numero.



ORA ESPERANTO-FERIADO

(Sub aŭspicio de MONDA ESPERANTO-TURISMO)

De la 17-a ĝis la 30-a de septembro 1972 en la pitoreska montara restadejo Pamporovo, kiu situas je 1.620 m supermara nivelo, en fabele bela naturo okazos LA ORA ESPERANTO-FERIADO. Tiun ĉi aranĝon ĉiujare organizas la Distrikta Esperanto-Komitato, urbo Smoljan.

Detalajn informojn pri la Feriado kaj aligilojn oni povas ricevi de: DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO, SMOLJAN, BULGARIO.



DI-SERVO

Paroĥestro **Kuno Aberg** predikos en la Metodista Preĝejo de Västerås, Smedjegat. 2, (proksime al kongresejo) en la Dua Pentekosta Tago je la 9-a horo antaŭtagmeze.

Ĉiuj kongresanoj bonvenaj!

KELI

RUSAJ RADIOJ

De E RYTENBERG

Mi vizitis Moskvon dum pasinta jaro dufoje por unu semajno. Se oni petus min skribi pri miaj impresoj per nur kelkaj vortoj, tio estus por mi tre malfacila tasko. Mi devus respondi same kiel pri Usono: impresoj ĝenerala estis tre diversa, kaj bona kaj malbona.

Antaŭ ĉio mi devas substreki ke miajn impresojn kiel ĉiam mi redonas subjektive tiel kiel plaĉis persone al mi en ĝuste tiu momento. Mi ankaŭ devas substreki ke en miaj impresoj ne estas miksitaj iu ajn sentoj politika. Dum ĉiuj interparoloj kun diversaj personoj en Moskvo, ĉu profesiaj kontaktoj, ĉu kontaktoj kun moskvaj esperantistoj, nek mi nek ili aludis eĉ per unu vorto politikon. Eble la sola escepto estis kiam kelkaj s-anoj kritikis per akraj kaj amaraj vortoj Stalin pro liaj persekutoj de Esperanto kaj ĝiaj aktivuloj, dum kelkaj aliaj personoj menciis la nomon de tiu diktatoro kun kvazaŭ respekto.

Tuj post la eliro el la flughaveno de Moskvo frapis min speciala odoro versaĵne kaŭzita de alimaniere rafinita benzino. Saman odoron mi sentis en la komenco de mia restado en Usono. Post du tagoj mia flarilo alkutimigis kaj mi ne plu pensis pri tio.

Centra parto de la sovetia ĉefurbo estas ne nur interesa por sia alieco kompare kun okcidentlandaj urbejoj, sed tute simple belegra. Tiaj urbanistaj perloj kiel la Ruĝa Placo kaj Kremlo havas malmultajn kompareblaĵojn en la mondo. Vagadi en la centro de Moskvo admirante jen la Ruĝan Placon kun la maŭzoleo de Lenin kaj katedralo de S-ta Bazilo, inter la muroj de Kremlo kun ĝiaj orkupolaj preĝejoj plenaj da historiaj memoraĵoj, la poste konstruitajn registarajn palacojn en stilo pli moderna, sed harmonianta kun la ĉirkaŭantaj domoj, kaj la tute novan "kongrespalacon" enhavanta teatron kun ses mil sidlokoj, ĉio ĉirkaŭita per mezepoka muro — tio faras ne forgeseblan impreson. La netakseble valoraj kolektaĵoj en la t.n. Armora muzeo blindigas pro sia riĉeco. Ĉiutage venas al Moskvo cent mil da eksterlandaj kaj unu miliono da enlandaj turistoj, ĉie oni aŭdas ilin paroli multnombrajn lingvojn (mi aŭdis ankaŭ la svedan).

Malgraŭ certaj avertoj antaŭ ol alveni al Moskvo, mi havis ĉiam senton de sekureco, gastameco kaj afableco... krom flanke de la kelneroj. La nete malbona servado batas rekordojn. Sed en la aero kuŝis ia hejmeca atmosfero, almenaŭ mi persone havis tian senton. Mi ripetis: dum tiuj du semajnoj en Moskvo mi

tuŝis la politikajn problemojn kun neniu. Profesie mi kontaktis la centrajn oficejojn kiuj aĉetas eksterlandajn aparatojn por universitatoj kaj malsanulejoj. Mi ankaŭ vizitis apartajn sciencistojn en iliaj laboratorioj. Ĉie mi renkontis afablajn kaj dankemajn personojn. La homoj sur stratoj, en magazenoj, aŭtobusoj, subtera vagonaro estis pure kvankam simple, vestitaj. En parkoj kiantaj ĝejunuloj, knabinoj kun moderna 'maxi' kaj 'midi'. Minijupoj jam pasis ankaŭ tie, tute same kiel en kiu ajn alia metropolo. Stratoj tre larĝaj, pli larĝaj ol en aliaj grandurboj, ŝajnas ankoraŭ pli larĝaj pro la maldenseco de aŭtoj. Kaj puraj, eĉ ne papereto surstrate! Ne plu ekzistas maljunulinoj balaantaj la stratojn, kion mi fakte atendis. Nur hermetike tutfermitaj aŭtopurigiloj balaas aŭtomate kaj senpolve. Sama pureco regas en la subtera vagonaro. Tiu ĉi superas ĉiujn priskribojn. Speciale kelkaj centraj haltejoj kun mozaikaj bildoj pri la rusa historio kaj revolucio estas tiel artiste faritaj ke oni preskaŭ ne volas kredi siajn okulojn; kristalaj lampkronoj, bronzaĵoj kaj gipsaj skulptaĵoj kaj — dekmiloj da homoj kiuj en ordo rapidas kvazaŭ senĉesa torento. La rulŝtuparo funkcias multe pli rapide ol en Stokholmo kaj ĉiu rulŝtuparo estas eble 100 metrojn longa, de la supra oni apenaŭ vidas la malsupron. Ĉiuj stratveturiloj estas tre malmultekostaj: 20—30 oeroj.

Dum la centro de la urbo brilas per sia beleco, la periferiaĵoj kaj suburbaj partoj estas ĝenerale grizaj kaj enuaj kun malnovaj domoj ne renovigitaj dum longa tempo. Sed meze de tiu grizo ofte aperas belaj lokoj aŭ monumentoj, ekzemple la moderna monumento pri Sputniko en la Aleo de Kosmonaŭtoj, vespere lumigita kvazaŭ brila meteoro rapidanta al foraj spacoj kontraŭ la fono de malhela nokta ĉielo. Ankaŭ la regiono de la Universitato estas bele situata sur monto kun impona panoramo de la tuta metropolo ĉe la rivero Moskvo, kiu ĝin ĉirkaŭas.

Mi estis invitita hejmen al iu konata medicina profesoro. Oni tuj alportis trinkaĵojn kaj mangajaĵojn en abundega kvanto: fama rusa gastameco. Sed la standardo de la loĝejo de tiu universitata profesoro (kategorio kun la plej altaj salajroj: 300—500 rubloj monate, 1 rublo = 1,20 US \$) kiu, mi kredas, estas tipa, estas multe pli malalta ol loĝejo de meza sveda laboristo. La luprezoj estas tre malaltaj sed multaj familioj devas dividi saman loĝejon, ofte kuirejon, telefonon ktp. En tiu ĉi grava kampo, do, la komparo estas klare negativa. Estas malfacile kompari la vivnivelojn de tiu lando kun okcidenteŭropaj sed, se oni scias ke la meza salajro estas

75—150 rubloj monate, kio laŭ oficiala kurso egalas al 500—850 svedaj kr., oni devas samtempe observi, ke impostoj estas tre malaltaj. Artikloj tre malmultekostaj krom la jam menciitaj publikaj veturiloj estas libroj, gazetoj, cigaredoj, alkoholaĵoj, teatroj, koncertoj. Mangaĵoj kostas same kiel ĉe ni. En restoracioj, kiuj ĉiam estas plenŝtopitaj, menuoj havas ankaŭ samajn prezojn kiel ĉe ni. La mango estas bongusta, varia, se oni havas paciencon kaj bonŝancon esti priservita. Vestaĵoj estas relative multekostaj kaj de malbona kvalito. Tamen sur la stratoj oni fakte ne vidas homojn malbone vestitaj.

Tre impona estas la maŭzoleo de Lenin, antaŭ kiu ĉiutage serpentas kilometro-longaj vicoj da turistoj. Kiam mi elpaŝis el mia vicloko por filmi tiun homarserpenton, tuj venis policisto kaj per afabla tono admonis min lasi filmaparaton en speciala vestejo, ĉar filmado interne de la maŭzoleo estas kompreneble malpermesita. La korpo de Lenin kuŝas en la kavoj de la maŭzoleo tre klare lumigita per reflektoroj. Frapis min du detalaĵoj pri la korpo: unue ke li estis tre malalta kaj due ke lia barbo kaj haroj estis blondaj. La honorgardistoj staras ambaŭflanke kvazaŭ marmoraj statuoj senmovaj. Malantaŭ la maŭzoleo de Lenin estas vico da tomboj de merititaj civitanoj kaj herooj. La unua en la vico — Stalin. Apud la muro de Kremlo en la parko situas la tombo de la nekonnata soldato, kovrata ĉiutage per centoj da freŝaj floroj de amasoj da turistoj el la tuta Sovet-Unio. Oni vidas seninterrompe unopajn homojn kaj grupojn da lernejoj veni por respektplene meti florojn sur la tombon kaj resti por momento pie antaŭ la eterna flamo.

Mi vizitis kompreneble kelkajn distrejojn, i. a. la faman "Bolŝoj"-Grandan Teatron, kie mi admiris la francan baledon "Giselle" kaj "Cikonian Lagon" de Ĉajkovski. La teatrejo mem estas nek speciale bela nek pli interesa ol multaj aliaj operejoj en aliaj mondmetropoloj. Sed la muziko, akustiko estis altklasaj. Pri danco mi ne estas eksperto, sed oni eble povas kredi ke la rusoj danacas pli bone ol aliaj. Kostumoj kaj dekoro estis riĉaj. Mi iris ankaŭ al la mondfama cirko kun cirkartistoj de vere alta nivelo. Precipe la ĉevalrajdistoj montris preskaŭ nekredible malfacilajn gimnastikajn ekvilibrajn numerojn.

Mi renkontis ankaŭ kelkajn esperantistojn. Malgraŭ la aserto de iu el ili pri subteno flanke de la registaro, mi kredas ke la sovetia registaro ne subtenas nian movadon pli ol aliaj registaroj. La Esperantogrupo de Moskvo havas ĉambron en la "Domo de Instruistoj" en la centro apud la Granda Operejo kun libro-

SEF—JARRAPORTO

Estraro

La Estraro konsistis el jenaj membroj: J. Ströme, prez., R. Hjorth, v. prez., S. Alexandersson, sekr., B. Åkerberg, F. Luin, Ulla Luin, T. Jansson, v. sekr., kun A. Malmkvist kaj Maria Wästfelt, kas. kiel anstataŭantoj.

Bibliotekisto estis R. Hjorth.

Ĉe la fino de la jaro la estraro decidis, ke ekde la 1:a de jan. 1972 s-ino Ulla Luin estu sekr. kaj S. Alexandersson kas.

Membraro

Je la fino de la jaro SEF havis 1.654 membrojn. Jenaj distr. funkcii: Dalekarlia, Okcidentisveda, Skania, Skaraborga, Värmland-Dal kaj Örebro-gubernia.

Mortis nia ŝatata poetino Magda Bohman-Carlsson, kiu fariĝis 75-jara la saman jaron. I. a. Sveda Poemaro kaj Evangelia Kantaro memorindaj. En Borås mortis s-ro Otto Rösel, 101-jara esperantisto.

Organizado

La Estraro decidis ek de 1972 sendi al la kluboj cirkulerojn laŭ nomo Klub-Info kun aldono Klipp-Info.

Ekonomio

La ekonomian staton montras aparta ekonomia raporto. F-ino Magda Bohman-Carlsson testamentis al SEF 3.000 kronojn.

Jarkongreso

La jarkongreso okazis 29—31 majo (pentekoste) en Stokholmo, kie Malmen kaj Medborgarhuset estis ejoj por 110 partoprenantoj. Bankedo en Skansen. Oficiala poŝta stampo. Ekskurso al Drottningholm. Kantoj de gejunuloj el Svängsta. Kabaredo. Fervoja rabato. Diservo de KELI kun Erik Carlén.

La federacia gazeto

La Espero aperis kun entute 84 paĝoj. Eldonkvanto 2.000 ekz. Tib. Morariu nun literatura red. flanke de la ĉefred. Åke Blomberg kaj tekn. red. Sune Ahlm.

ŝranko kaj murgazeto ĵus gloriganta la "heroajn sovetajn kosmonaŭtojn". La esperantistoj estis ĉiuj tre afablaj kaj montris grandan intereson pri mia vizito. Tre bedaŭrinde, mi ne povis laŭ ilia invito partopreni la dimanĉan ekskurson ĉar ĝuste tiam mi devis reflugi hejmen.

La Estraro daŭrigis la diskutojn kun la aliaj skandinaviaj federacioj pri eventuala komuna gazeto.

Unu numero enhavanta plurajn informojn pri la E-movado en Finnlando estis laŭ interkonsento sendita al la finnaj esperantistoj.

La Universala Kongreso

okazis en Londono 31/7—7/8 1971. Salutis de la sveda registaro docento Ebbe Vilborg kaj por SEF s-ino Ulla Luin. Ĉeestis la kongreson 110 svedoj. Skandinavia grupvojaĝo de Kopenhago vizitis dum unu semajno antaŭ la kongreso Irlandon kun vizitoj i. a. en Dublino.

Universala Esperanto-Asocio

La 31-an de dec. 1971 UEA havis en Svedujo 199 delegitojn en 91 lokoj kaj entute 488 individuajn membrojn. Je nomo de SEF s-ino Ester Andrén, Malmö, akceptas pagojn por UEA kaj por UK.

Sveda Esperanto-Instituto

decidis denove aranĝi en 1972 prelegsemajnon en Frostavallen kaj presigis informilon por disdono jam ĉe la UK Londono.

Eldona Societo Esperanto

donas siajn informojn en speciala raporto. La libro "Tra lando de indianoj" de Tibor Sekelj aperis en la komenco de la jaro.

Informado

Esperanto-Nytt (Novajoj pri E.) regule aperis. Red. Sten Öfors. Kluboj kaj unuopaj esperantistoj daŭre pli kaj pli abonas la informilon por influhavaj personoj prefere en la propra urbo. Eldonkvanto: 4.000.

Informa Fakoj sendas de tempo al tempo novaĵojn al la gazetaro laŭ nomo "Servo Informa".

La tria Semajno de Internacia Amikeco okazis 21/2—28/2 1971. Festaj kunestadoj ĉe pluraj kluboj. Afiŝoj por butikoj. Poŝtkartoj por unuopuloj. Ĉijare ankaŭ glumarkoj.

La ekspozicio ĉe Skania Foiro havas ĉiujare novan aspekton. Broŝuroj transdonitaj al vizitantoj el la tuta lando. Ĉijare i. a. aŭtomata bildmontrado.

S-ino Anna-Alamo Sandgren kaj aliaj el pluraj lokoj faris entute ĉ. 230 prelegojn pri Esp. antaŭ ĉ. 10.000 neesperantistoj.

En la sveda gazetaro aperis ĉ. 200 gazetartikoloj kaj -notoj pri E.

Ĉ. 10.000 afiŝoj, flugfolioj, prospektoj, broŝuroj kaj aliaj propagandiloj

distribuitaj (parte materialo ĉe distriktoj, lokaj societoj, KELI aŭ SEJU).

Nova broŝuro pri E pretigita.

Notitaj estas 2 TV-programoj kaj 1 radioprogramo kun informoj pri E.

S-ro J. Berggren, Norvegujo, vizitis skoltajn grupojn i. a. en Kungälv kaj Hisingskärra informante pri E. Jam ekzistas intereso ĉe pluraj skoltaj grupoj. La E-klubo certe povas veki pli da intereso (la jamboreo venonta en Norvegujo en 1975).

Gotenburgaj esperantistoj informis per leteroj ĉiujn geinstruistojn en la urbo pri E kaj atentigis pri kurso.

Instruado

Pli kaj pli la kluboj aranĝas konversaciajn duonhorojn antaŭ la semajnaj kunsidoj.

La skribajn taskojn de la koresponda kurso de SEF prijuĝis s-ino Lisbet Andreasson, f-ino Marie-Louise Enström, s-roj Runo Stridell kaj Sten Öfors.

La klubo en Skövde aranĝis E-kursojn por eksterlandaj gastlaboristoj.

La "Kursagado en la Universitato de Gotenburgo" akceptis Esperanton inter siaj temoj por la vesperaj kursoj.

"Libere elektita laboro" jam trovis kelkajn grupojn (ekz. ĉe s-ro Farm, Sundsvall), kiuj elektis Esperanton. Ni kun ĝojo aŭdos pri pluraj.

Dum 3-taga libera periodo de la lernejoj en Malmö kaj Lund kun multaj variaj aktivajoj por la gelernantoj pluraj el ili ankaŭ en 1971 elektis 3-tagan kurson pri E en ambaŭ lokoj.

Nederlando kaj Slovakujo ambaŭ pretigis E-kursojn por televido. Kiam detaloj pri rezultoj estos konataj, SEF denove havos kontakton kun la sveda TRU.

Praktika aplikado

Kiel jam menciite 100 svedoj partoprenis la UK-n de Londono. Krome svedoj veturis al fakaj E-kongresoj en diversaj landoj.

La kluboj ofte aranĝis prelegojn por eksterlandaj E-istoj.

La sved-dana E-tago okazis en Malmö, kie la urbo regalis ĉiujn per matenmanĝo en Riddarsalen, Malmöhus, kaj aŭtobusekskurso tra la urbo.

La lingvopremio de la Stokholma Pac-Asocio estis aljuĝita al s-ro Andreo Cseh.

Okaze de urba jubileo en Gotenburgo estis aranĝitaj E-renkontigoj en la urbo.

SEF, membro de la sveda UNO-Asocio, partoprenis diskuton pri "La celo de la UNO-Asocio kaj ĝia estonta agado".

Sekcioj

La Esperanto-Fondaĵo decidis meti stipendion je dispono por gejunuloj, kiuj en la somero 1972 partoprenos la universitatajn kursojn en Liège.

La klubo en Halmstad metis je dispono stipendiojn por gejunuloj, kiuj partoprenos E-aranĝojn en 1972.

La gejunula sekcio SEJU dissendis en la jaro 4 numerojn de sia informgazeto Kvinpinto.

Finvortoj

La Estraro kore dankas al ĉiuj kiuj en diversaj manieroj kunhelpis pri la necesa kaj ĉiutaga laboro por la federacio. Ni esperas, ke la kunlaboro daŭru.

La estrarmandatoj laŭstatute finiĝis por J. Strönne, R. Hjorth, S. Alexandersson, F. Luin kaj la anstataŭanto A. Malmkvist.

Stokholmo la 1-an de aprilo 1972.

Jan Strönne

Ragnar Hjorth

Ulla Luin

Sven Alexandersson

Bertil Åkerberg

Franko Luin

Tomas Jansson

POSTSTÄMPEL

Brev som postas i en särskild brevlåda under SEF:s årskongress i Västerås kommer att stämpas med en speciell poststämpel.

Om du vill ha ett brev med den stämpeln — eller sända ett brev till någon du känner — och inte själv har möjlighet att posta det under årskongressen, gör så här:

Sänd **1 kr** till Svenska Esperanto-Förbundet, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm (postgiro 507461-2 Esperanto-kongressen) och meddela vilken adress som skall stå på kuvertet. Men gör beställningen omgående.



LA SKANIA DISTRIKTO, kiu nun nomiĝas la **SUDA DISTRIKTO** kaj ampleksas pli vastan regionon, jarkunvenis en Halmstad la 12-an de marto. La bildo montras de maldekstre Gunnar Tenglin, prez. de la Esperantoklubo de Halmstad, Jan Strönne, prez. de SEF, Elisabeth Nilsson, sekretario de la distrikto, Ebbe Vilborg, gastpreleganto, Olle Olsson, prez. de la distrikto.

LINGVO KAJ KONFERENCO

En internaciaj konferencoj oni parolas multe pri lingvoj.

En Stockholm okazis fine de marto (19—24) junulara konferenco pri hommedio. Estis konferenco de diversaj internaciaj junularaj organizaĵoj, kaj tie ĉeestis plejparte universitataj studentoj kaj aliaj kun tre alta eduko. Oni diskutis la gravajn problemojn de malpurigo de akvo kaj aero, urbplanado, labormedio. La raportoj el la diskutoj estos sendataj al la UN-konferenco pri hommedio, kiu okazos en Stockholm en junio.

Laborlingvoj estis la angla kaj franca. Oni disponis pri 6 interpretistoj (kelkaj nur parton el la tempo) por ke la ĉ. 70 partoprenantoj povu diskuti kune. Tamen oni sentis plurajn malfacilaĵojn.

Pluraj personoj plendis pri la ĝeno kiun ili sentas parolante en fremda lingvo. Ili ne trovis la ĝustajn vortojn, ili hontis ke ilia elparolo estas malbona, ili havis malfacilaĵojn kompreni tiujn kiuj prononcis malbone.

La partoprenantoj ĝenerale grupiĝis en 3 ĉefgrupojn: skandinava, angleparolanta, francparolanta. Se oni farus sociologian esploron pri la grupoj, oni rimarkus ke kelkaj homoj miksiĝas inter la grupoj, sed kelkaj tenas sin ĉefe en unu el la grupoj.

La laboro okazis en diskutgrupoj je ĉ. 20 personoj. Tio estas tro granda nombro por efika gruplaboro, kaj tial la grupoj siavice dividiĝis en subgrupojn. En unu kazo tio ne eblis, ĉar ne eblis dividi la aparataron kaj la interpretistojn. Iu proponis ke ĝi

dividiĝu laŭ lingvaj limoj, sed oni tuj rimarkis ke en tiu kazo la dividiĝo okazus laŭ politikaj limoj, kaj ĝuste la diskuto trans tiuj politikaj limoj estus interesa.

La orienteŭropanoj troviĝis ĉefe en la francparolanta grupo. En la angleparolanta grupo oni povis rimarki certan suspekteton al la orienteŭropanoj, ekzemple kiam foje unu el ili interrompis la anglan tradukadon por korekti vorton. Kelkaj angleparolantoj tuj eksuspektis ke la orienteŭropanoj scias la anglan kaj volas kaŝaŭskulti ion.

Pri tiuj homoj kiuj povus esti ĉeestintaj la konferencon se estus pli da laborlingvoj, pri ili neniu pensis. Pri neĉeestantoj oni pensis nur ĉar la kosto de la vojaĝo malhelpis al reprezentantoj el evolulandoj ĉeesti.

Kiel resumon de la lingva flanko de la konferenco mi volas mencii ke certe ĉiuj sentis lingvaj malfacilaĵojn. Tamen oni ne konscias ke tio estas ĝenerala problemo, sed komprenas la malfacilaĵojn kiel personan problemon. Oni ne protestas, sed fermas sin en sia honto.

Necesus klarigi ke la lingva problemo estas multe pli vasta, ke por la plejparto de la junuloj ĝi estas multe pli serioza ol por tiuj gvidantoj kiuj havas altan edukon kaj aliron al interpretistoj.

Estus interese scii kiel aliaj organizaĵoj sentas kaj solvas la problemon je siaj propraj internaciaj renkontigoj.

Ulla Luin

Ideologiaj ŝanĝoj en la Esperantomovado

2:a parto

La Deklaracio estis tre klara rilate al la signifo de la Fundamento, sed la pozicio de la interna ideo en la oficiala ideologio restis malklara. Ĝi ne menciigis en la Deklaracio, do ŝajnus, ke ĝi ne estis parto de la oficiala ideologio. Tamen en la Dua Kongreso de Esperanto Zamenhof rekonfirmis la pozicion de la interna ideo en Esperanto. En sia malferma parolado, en Genevo, Zamenhof diris: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!" Kaj li intencis diri pli. Pli frue en 1906 li publikigis la dogmojn de Hilelismo (Homaranismo) en **Ruslanda Esperantisto**. Li intencis diri pli multe pri la nova religio en la Geneva Kongreso, kvankam emfazante ke tio estis nur privata opinio; tamen li intencis kuraĝigi tiujn, kiuj konsentis kun liaj principoj. Sed antaŭ la Geneva Kongreso pluraj esperantistoj estis atakintaj la novan religion, kaj inter ili estis de Beaufront. En julio 1906 la atakado tiel fortigis, ke Javal konsilis al Zamenhof, ke li ne iru al Genevo. Persvadita de Sebert, Zamenhof decidis iri al la kongreso, sed en sia parolado li ne menciis Homaranismon. La plejmulton de la tempo li uzis por paroli pri la interna ideo. Li diris ke:

"...krom la flanko **praktika**, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean."

Tiel la voĉo de Zamenhof kiu, ĉu tio placis al li, ĉu ne, estis tiutempe ege aŭtoritata por esperantistoj, konfirmis la idealan flankon de la ideologio de Esperanto; diris ke ĝi estas pli grava ol la praktika; kaj kuraĝigis idealismemajn esperantistojn. Sed Zamenhof intencis paroli ne nur pri la interna ideo, sed pri Homaranismo. Sed komprenante pro la polemiko kiun okazigis lia antaŭa artikolo, ke Homaranismo ne akordis kun la tendencoj de multaj movadanoj, li anstataŭigis sian religian idealon per nereligia idealo. Tamen la religia idealo gravas al Zamenhof persone, kiel indikas la postaj okazintaĵoj. En Genevo la religia idealo estis malakceptita kiel taŭga temo por neŭtrala kongreso. Aliflanke la nereligia idealo, la interna ideo, estis tre taŭga temo; tiamaniere ĝi fariĝis esenca elemento en la kulturo de Esperanto, eĉ se ĝi ne ĝuste estis elemento en la oficiala ideologio.

En Cambridge en 1907 Zamenhof denove parolis pri la interna ideo en

sia kongresa parolado. Li deklaris ke tio estis nur lia privata opinio, sed li supozis ke ĉiu, kiu venas al Universala Kongreso de Esperanto interesigas pri la idealisma flanko de la movado. La kongreso estis la unua okazo, en kiu li uzis la terminon Esperantujo, kaj li parolis pri la kongreso tiel, kvazaŭ ĝi estus utopia komunumo. Post la kongreso, dum sia parolado en la londona Guildhall, Zamenhof defendis esperantismon kontraŭ la akuzo, ke ĝi kuraĝigas malbonan patriotismon. Li diris ke konflikto ne povas ekzisti inter la esperantismo, kiu predikas amon, kaj tiu patriotismo, kiu predikas amon. Tiel li esprimis la principon de "unueco en diverseco", kiun esperantistoj plejparte ŝajne akceptas, sed kiu ne estas akceptata de sennaciistoj. Dum sia vizito al Britio, Zamenhof multe klarigis la signifon de la interna ideo. Li diris en Cambridge:

"Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la **internan** vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei ligitan ponton **inter** la gentoj."

Iuj argumentus, ke tio indikas konserveman starpunkton rilate ekzemple al klaskonflikto.

Ne okazis novaj disvolvigoj en la ideologio de la Esperantomovado dum la resto de la periodo, kiam kongresoj malfermiĝis per "privata" sed ege influa parolado de Zamenhof. En 1912, en la Krakova Kongreso, Zamenhof formetis sian formalan oficon kiel ĉefo de la Esperanto-movado. Li deziris dediĉi plie sian atenton al Homaranismo, sentante konflikton inter sia ofico en la Esperanto-movado kaj siaj personaj tendencoj. Li menciis tiun konflikton en sia parolado al la Krakova Kongreso. Lia nova libereco ebligis, ke li eldonu libron pri Homaranismo la sekvan tatan jaron, uzante sian propran nomon.

La eksigo de Zamenhof finis la duan periodon en la historio de la Esperanto-movado. Kvankam ili estis neoficialaj kaj privataj, la opinioj de Zamenhof esprimitaj en liaj kongresparoladoj estis tre influaj, kaj multaj elementoj en la ideologio de Esperanto fontas el tiuj paroladoj. Ili ankoraŭ havas grandan influon. La verkoj kaj biografio de Zamenhof estas ankoraŭ vaste legataj inter la esperantistaro; sed post la Krakova Kongreso la graveco de la ideala flanko de la ideologio de Esperanto laŭgrade malpliigis.

La ideala flanko de la movado malpli gravigis pro du kialoj. La ŝanĝo okazis unue pro evolumaniero, kiu trovigas tiel en la Esperanto-movado, kiel en ĉiuj sociaj movadoj; kaj due pro ŝanĝoj en la pli vasta mondsocio.

Post la Ido-skismo, la monda Esperanto-movado respondis per zorga konsidero al racia organizado, ĉar la

ida polemiko atentigis pri la neceso de aŭtoritata esperantista voĉo. La ida polemiko plirapidigis tiun dissolvigon, sed ĉiokaze la movado estus baldaŭ konsiderinta racian organizaĵon. La fondo de la Lingva Komitato **antaŭ** la Ido-skismo montris, ke la movado jam eniris la **organizan fazon**, laŭ la termino de C. Wendell King. Dum tiu fazo, King atentigas:

"Originalaj celoj estas retaksataj: kelkaj estas nun difinataj kiel estontaj pliguste ol tujaj eblaĵoj, aliaj estas tute forstrekataj kaj anstataŭigataj per tute aliaj celoj. Pro tio, ke valoroj kaj celoj de la komenca fazo de la movado estas plejparte ĝeneralspecaj, nun estas aldonataj al ili pli precizaj celoj kaj valoroj, precipe se penoj je konvertigo de la homoj jam ne estas fruktodonaj."

Tiutempe la Esperanto-movado jam estis enskribinta en sian ideologion kaj estontecajn kaj tujajn, precizajn celojn kaj valorojn: unuflekte la internan ideon, aliflanke la lingvon mem. Je tiu stadio oni formetis la internan ideon ĝis la estonteco, kaj tujan atenton oni donis al la lingvo. Ankaŭ je tiu stadio, okazis videbla kresko de institucioj, kiuj utilis kiel praktika esprimo de la idealisma flanko de la ideologio. En tiun kategorion oni povas inkluzivi la delegitan reton, proponitan en Genevo, sed ne firme establitan ĝis la Dresdena Kongreso en 1908. Ankaŭ dum la Unua Mondmilito, la ideala kaj la praktika flanko, kunigis per la korespondaj-transsenda servo de UEA.

Tiu evoluaĵo en la Esperanto-movado okazis samtempe kun ŝanĝoj en la pli vasta mondsocio, kiuj profunde tuŝis la rolon de UEA. La plej signifaj okazintaĵoj estis la Unua Mondmilito, kaj la posta fondo de Ligo de Nacioj. La Unua Mondmilito estis ŝoko tiel al la Esperanto-movado, kiel al aliaj pacamaj movadoj. Tiel esprimas ĝin Privat:

"Antaŭ la milito, Esperantismo estis belega revaĵo. Post la milito ĝi jam aperis kiel urĝa bezonaĵo."

Unuavide tiaj sociaj cirkonstancoj ŝajnus esti kondiĉoj, kiuj donus al la ideala flanko de Esperanto fortan antaŭenpuŝon. Sed ni devas memori, ke movado povas pleje flori inter kondiĉoj, kiuj ŝajnus la plej malfavoraj al ĝi. La grandegeco de la suferado dum la milito certe ŝajnis la idealon de mondfrateco kaj paco esti urĝa bezonaĵo, sed ne nur estis la esperantistoj kiuj komprenis tion. La registaroj de la plejparto de la nacioj en la mondo ankaŭ vidis tion. Principe, se ne praktike, por multaj popoloj en la mondo, idealoj de internacia kunlaborado, anstataŭigo de milito per arbitracio en internaciaj konfliktoj, protektado de gentaj, lingvaj kaj religiaj malplimultanoj, kaj similaj principoj, ĉiuj fariĝis re-

gantaj anstataŭ deviaj valoroj. Tiamaniere la idealoj implicitaj en la interna ideo fariĝis elemento en la internacia vivo.

Tiel la milito kaj ĝiaj konsekvencoj okazigis la fondon de Ligo de Nacioj. La celoj de la Ligo, difinitaj en ĝia kontrakto, estis interalie: "Antaŭenigi internacian kunlaboron kaj atingi internacian pacon kaj sekurecon, per la akcepto de devigoj, ke oni ne sin turnu al milito, per la difino de malfermaj, justaj kaj honorindaj rilatoj inter nacioj..." La Ligo certe ne estis pacifista organizo, sed ĝi certe akceptis ideojn similajn al la interna ideo de Esperanto.

Kvankam la Ligo akceptis principe iom el la ideala flanko de la ideologio de Esperanto, la lingva flanko estis tute alia afero. La Ligo donis al la esperantistoj perfektan ŝancon propagandi siajn lingvajn celojn. Ĉe la traktato de Versailles la franca lingvo jam perdis sian diplomatan monopolon, kaj en 1920, dum la unua kunveno de la Ligo, oni diskutis la lingvan problemon. Dum tiu periodo, la esperantistoj dediĉis sian atenton al demonstrado de la praktikaj avantaĝoj de Esperanto por Ligo de Nacioj. En 1922 la Ligo eldonis raporton "Esperanto kiel internacia helplingvo". La diskutado finiĝis kiam la Komisiono por Intelektua Kunlaborado, al kiu la afero estis direktita, ne rekomendis Esperanton por konsidero de la ĝenerala kunveno de la Ligo. Tiun decidon la Ligo mem neniam konfirmis. La sekvintan jaron la Ligo konsilis al siaj membroj, ke ili akceptu Esperanton kiel "klarigan" lingvon por telegramoj.

Do la Ligo nek akceptis nek malakceptis Esperanton kiel lingvon. La esperantistoj trovis, ke kvankam la lingvo estis serioze traktita, ili ne povis tiutempe sin turni al la Ligo por tutkora oficiala apogo. La lingva flanko de la ideologio de Esperanto restis devia, sed malpli ol antaŭe. Rimarkinde estas, ke kvankam dum la intermilita periodo la Esperantomovado multe interesis sin pri la laboro de Ligo de Nacioj, ĝi neniam oficiale subtenis la Ligon. Tamen la starpunkto de la movado ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, post la Dua Mondmilito, estis malsimila.

Kiel la Unua Mondmilito, la Dua Mondmilito sentigis homojn kaj naciojn, ke necesas ekzisti organizo por malokazigi denovan katastrofon; pro tio fondiĝis Unuiĝintaj Nacioj. Unuiĝintaj Nacioj estis multe pli firme establitaj ol la Ligo de Nacioj; kaj ĝiaj celoj eĉ pliproksimiĝis al la idealoj tiaj, kiujn subtenas la ideologio de Esperanto. La celoj de Unuiĝintaj Nacioj, laŭ ĝia statuto inkluzivas: konservadon de internacia paco kaj sekureco, disvastigadon de amike-

maj rilatoj inter nacioj, respekton por egalaj rajtoj kaj aŭtonomecon de la popoloj, antaŭenigon de respekto por homaj rajtoj, kaj similajn celojn. Kaj UNESKO celas:

"... kontribui al paco kaj sekureco inter la nacioj per edukado, scienco kaj kulturo, por antaŭenigi universalan respekton de justeco, de la leĝo, kaj de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kiuj estas asertataj por la popoloj de la mondo sen diskriminacio pro gento, sekso, lingvo kaj religio, pere de la statuto de Unuiĝintaj Nacioj."

Tiu deklaro eĉ pliproksimiĝas al la idealoj, kiujn subtenas la Esperantomovado. Ĝi ne evitis atenton per la Esperantomovado, kaj la organizoj de Unuiĝintaj Nacioj estis plurfoje petataj, por ke ili plifaru kaj apogu ankaŭ la lingvon. Tiu klopodado iom sukcesis, ĉar en 1954 UNESKO akceptis rezolucion, ke ĝi sekvu la uzon de Esperanto en Edukado, Scienco kaj Kulturo, kaj kunlaboru kun UEA pri aferoj, kiuj koncernas ambaŭ organizojn.

La starpunkto de UEA rilate al Unuiĝintaj Nacioj malsimilas al ĝia starpunkto rilate al Ligo de Nacioj. La Esperantomovado multe pliproksimiĝis al apogo de la celoj de UNO en si mem, ol okazis ĉe la Ligo. UEA ne nur okupiĝas pri lingvaj malfacilaĵoj en Unuiĝintaj Nacioj kaj en ĝiaj specialaj organizoj (kvankam ĝi ja okupiĝas pri ili). UEA plifaras, kaj instigas al esperantistoj, ke ili celebru la Tagon de Homaj Rajtoj kaj la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj.

Pro la starigo de organizoj kiel Ligo de Nacioj kaj poste Unuiĝintaj Nacioj tiu, kiu antaŭe estis **persona** idealo de mondfrateco kaj paco transiris al **socia** idealo, realigenda per kunlaboro kun tiaj organizoj. La persona idealo regis, kiam tiaj organizoj ne ekzistis, sed kiam ili fondiĝis, la movado klopodis per ili por idealismaj celoj. La tendenco de la Esperantomovado ŝanĝiĝis diversmaniere. El **utopia komunumo** fondiĝis **propaganda** asocio. Persona idealo fariĝis socia idealo.

Ideologia ŝanĝo en la Esperantomovado ne okazis sen kontraŭstarantoj. Verdiro, kies opinion mi citis antaŭe, kritikas agadon per UNESKO kaj UNO. En sia artikolo "Neŭtraleco?" Verdiro argumentas, ke tia agado ne estas konforma kun la politika neŭtraleco de UEA: iuj personoj opinias, ke Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO "estas trompaj aferoj, kiuj servas la celojn — kaj nur la celojn — de la tutmonda financa monopolo, kies fundamenta celo estas la ensklavigo de la homaro".

Tuj kiam la Esperantomovado penas antaŭenigi sian idealan flankon per ia rimedo krom la lingvo, mal-

konsentaj voĉoj aŭdiĝas. Tio okazis dum la unua periodo, ĉe la universala religio de Zamenhof. Ĉe Homaranismo, malkonsentemo sufiĉe sukcesis, ke la ideo malakceptiĝu kiel elemento en la oficiala ideologio, ĉar universala religio estas devia valoro. Sed Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO estas esprimoj de regantaj valoroj, kaj neprobable estas, ke malkonsentaj voĉoj kiel tiu de Verdiro estos influemaj. Post la Dua Mondmilito UEA klopodis akceptiĝi en la pli vasta socio kiel serioza movado, kaj forigi la impreson, ke ĝi estas sekta aŭ strangula movado.

Tiun procezon fortigis la Princi-paro de Frostavallen, en 1956. Per tiuj principoj, oni admonas al esperantistoj, ke ili ne portu tro multe da verdaj steloj, ne tro multe kantu "La Esperon", ne uzu nacilingve vortojn kiel "samideano", kaj ne konduku ĝenerale tiel, kiel opiniigos la eksteran publikon, ke Esperanto estas stranga sekto.

Tiel en la Esperantomovado, kiel en aliaj sociaj movadoj, okazis klarigado de la movada ideologio, sekvita de klopodado, por ke tiu ideologio fariĝu pli akceptebla en la pli vasta socio. La Esperantomovado neniam estis granda movado, kaj pro tio oni atendus, ke tiu ŝanĝemo estus malrapida. Sed la procezon plirapidigis ŝanĝoj en la pli vasta mondsocio, nome la starigo kaj firmiĝo de raciaj organizoj celantaj internacian kunlaboradon.

Fontoj:

King, C. Wendell: **Social Movements in the United States**. New York 1956, p. 32.

Verdiro (pseŭdonimo de John W. Leslie): "Frak-esperantistoj". En: **Elingita glavo**. La Laguna 1962, p. 49-50. Represita el **The Socialist Leader**, 31-12-1955.

Privat, Edmond: **Historio de la lingvo Esperanto. La movado 1900-1927**. Vol. II. Leipzig 1927, p. 98.

Verdiro: "Neŭtraleco". En verko citita, p. 28-29. Represita el **The Socialist Leader**, 9-10-1954.

ANIGU AL O. R. E.

Ni bonvenigas vin en nian naturesciencan rondon kaj dufoje po jaro sendos al vi nian revuon "La Mevo". Jarkotizo 5: — kr. La monon sendu al Luise Karlsson, Telegrafg. 5, 149 00 Nynäshamn, ĝirkonto 69 92 61-4.

Proklamo de nacio Esperana

En la rubriko de tiu ĉi artikolo ne estas preseraro, la "T" estas intence ellasita.

Pri la enhavo respondecas kompreneble la aŭtoro mem. Al multaj legantoj la ideo eble ŝajnas utopia. Ni tamen konsideras ĝin interesa kontribuo al la diskutado pri la rolo de Esperanto en nia tempo, kaj ni volonte publikigos viajn opiniojn.

LA REDAKTORO

Esperanto ĝis nun

Antaŭ 85 jaroj Zamenhof publikigis sian proponon pri internacia lingvo. La bezono de tia lingvo estis jam aktuala kaj ĝis nia tempo la bezono daŭre kreskis.

85 jaroj estas konsiderinde longa tempo en la vivo de nenacia lingvo. Dum tiu evolua tempo de Esperanto kaj ĝia movado aperis aro da similaj lingvoj. Sole Esperanto sukcese adaptiĝis al la ĝenerala evoluo, kaj hodiaŭ ĝi egalas al kiu ajn lingvo rilate al praktika uzebleco — certarilate ĝi eĉ superas aliajn. Tio pruvas ke la kreaĵo de Zamenhof baziĝis sur praktika realeco kaj estis necese taŭga por ĝenerala uzado. Prave oni povas aserti ke Esperanto estas hodiaŭ moderna lingvo, evoluinta internacia komunikilo en la nuntempa komplika mondo.

El pure lingva vidpunkto la premisoj por oficialigo de Esperanto kiel internacia lingvo estas evidente favoraj. Sed spite al tio, spite al la multjara penado de l'tutmonda esperantistaro kaj la fakto ke Esperanto estas jam funkcianta mondlingvo nia celo ŝajnas ankoraŭ malproksima. Same ĝi ŝajnas malfacile realigebla per nia ĝisnuna metodo de agado. Manko de ekonomia potenco kaj politika influo obstine malhelpas nin.

Idealismo kaj progresigaj ideoj ĝenerale ne interesas al la homaro kaj speciale ne al aŭtoritatoj. Evidente nur eksterordinara ago sukcesus vekti atenton pri la mondampleksa funkcio kaj graveco de Esperanto.

La aktuala stato de l'mondo

La situacio de l'internaciaj rilatoj restas konstante kriza. La nacia konduto restas senmorala kaj la multlingva obstaklo preskaŭ sabotas la funkciadon de la civilizita mondo.

Necesas akceli pli prudentan interpopolan konduton, turni la kontraŭlaboron kaj krei entute novan koncepton pri tiu sortodestina afero. Necesas vivigi la ideon pri unuigita mondo, disvastigi kaj prezenti ĝin kiel seriozan kaj aktualan alternati-

von en la monda krizo. En tiu tasko ni havas centran kaj devan rolon.

Eble pli bona internacia ordo kaj unuigita mondo ĝuste nun ne ŝajnas kredinda evoluo, inter alie pro la politiko de la potenco-nacioj. Oni devas tamen pripensi ke la cirkonstancoj ofte rapide kaj radikale ŝanĝiĝas. Ĝuste nun laboras en nia mondo multe da nekonataj, ne klare rimarkeblaj faktoroj. En proksima estonto povos subite malkaŝiĝi neatenditaj konsekvencoj de tio, kaj tute novaj kondiĉoj povos prezenti sin al la mondo. Krome ni ne forgesu ke energia, sindona laboro por bona celo povas atingi mirigan rezulton. Tio ne estas idealisma fantazio sed pruvita realeco. Prefere ni tial preparu nin por nova, eble pli favora situacio por nia agado.

Esperanto kiel viva organismo

Nia movado konsistas el aro de diversspecaj institucioj, apartenaĵoj kaj funkcioj. La esperantistmon konsistigas ĝia centra ideo, la lingvo, la esperantistoj (la esperana popolo), la internaciaj kaj landaj organizoj, kongresoj, delegitaro, nia gazetaro kaj literaturo, la verda stelo, nia flago kaj himno.

En ĉiu mondparto, en preskaŭ ĉiu lando, en ĉiu tago kaj horo nia lingvo funkcias en diversaj interhomaj rilatoj. Per kaj por la lingvo laboras konstante la movadanoj. Mondkongresoj okazas regule, nia korespondado ĉirkaŭfluas la teron, ĉiutage radio dissonigas esperantan parolon. Nia lingvo tutmonde faciligas vojaĝojn kaj servadas en ĉiuspeca kontakto.

En ĉiu mondparto, en preskaŭ ĉiu lando, en ĉiu tago kaj horo nia lingvo funkcias en diversaj interhomaj rilatoj. Per kaj por la lingvo laboras konstante la movadanoj. Mondkongresoj okazas regule, nia korespondado ĉirkaŭfluas la teron, ĉiutage radio dissonigas esperantan parolon. Nia lingvo tutmonde faciligas vojaĝojn kaj servadas en ĉiuspeca kontakto.

Se ni konsideras ĉion menciitan, ni povas konkludi ke "ni" estas vere ia organisma unuo — ni estas viva nacio.

Proklamo de nia nacio kaj ŝtato

Evidente ni povus bone progresigian aferon per utiligo de nia nacia potenco. Per centrigo de nia ĝis nun disa forto la ĝenerala aktiveco pli efike rezultigis. Certe ni ĝuste en nia ankoraŭ dormanta nacio disponas pri kaŝitaj eblecoj kaj latentaj dinamiko. La nura fakto ke tia nacio estus proklamita havus sendube rimarkindan efikon, vekus ĝeneralan atenton kaj estus cetere historia evento de monda amplekso. La nova nacio kunportus en la mondon tute novan penson kaj tiel kontribuos per briko el nova materialo por la fundamento de mondo estonta.

Eble la cirkonstancoj kaj la ĝenerala kaj principa koncepto pri tiu-ĉi plano ne ŝajnas unuavide tre favoraj. Temas ja pri unika, nekonata situacio, sed pro tio ni neniel konsideru la planon utopia. La ideo ne estas pli utopia ol Esperanto mem, kaj sendube la tempo estas matura por ĝia realigo. Kompreneble oni povos regione atenci kontraŭ la ekzisto de la nova ŝtato malpermesante organizadon kaj uzadon de la lingvo en certa lando. Tio tamen estus nur limigita minaco. Jam dufoje nia movado levigis plenviva el la cindro de mondmilito. Ĝia interna forto pruvigis sufiĉa por vivigi propran nacion.

La nacio kaj ŝtato

Tiu nova tipo de nacio grave diferencus de ĉiu alia. Netrovebla sur ia mapo ĝi tamen kovrus la tutan civilizitan mondon. Ĝi havus specialan konstitucion kaj organizon. Ne havante teritorion, armeon aŭ nacie egoisman celon ĝi ne praktikus politikon sed laborus por kulturo kaj komuna bono de ĉiuj nacioj.

Civitano en nia ŝtato estus ĉiu izolata aliĝinto kaj ĉiu ano de landa aŭ internacia organizo esperanta. La civitana cefrajto estus absoluta, individua integreco. Nenia dekreto ekster konstitucion kaj leĝo povu devigi civitanon en maniero opona al ties konscienco aŭ volo kaze de persona afero. Cetere validu la deklaro de UN pri la Homaj Rajtoj.

La nova ŝtato estu religie tolerema. Granda parto de la esperantistoj havas religian inklinon. Ĉar anoj el ĉiuj religioj hejmos en nia nacio, ĝi ne povos dekreti avantaĝon por iu aparta kredo. Tamen la specialaj organizoj, ia vastigita KELI kaj la nekristanaj eklezioj povus korporacie aparteni al la ŝtata organismo.

Kunlaboro kun alispecaj internaciaj organizoj aŭ movadoj estas ankaŭ pripensinda. Eble oni povus konsideri eĉ ke la Ruĝa Kruco estus konsistiga organo en la ŝtata sistemo. Tiel Esperanto estus ĝia oficiala lingvo kaj vera faciligo por la internacia funkcio de R. K.

Certe nia mondvasta organizo povus akcepti diversajn taskojn en necesa kaj alispeca kunlaboro inter la nacioj, kunlaboro kaj servoj de komuna utilo, parencaj al la celoj de nia movado.

La propra valuto por interna komerco kaj aliaj bezonoj povus eble havi fiksan valoron.

Oficialigo de l'stato

Proklaminte la nacion ni postulu oficialigon de la esperanta ŝtato. Certe la oficialigo estas realigebla, speciale ĉar nia ŝtato kaj nacio neniel domaĝus al legitima rajto aŭ intereso de iu fizika ŝtato. Necesos pre-



Miriam Lion

LINGVO UNIVERSALA

PORTLAND

Före beställning av logi, utfärder etc. Tag kontakt med fru Ester Andrén, Malmö, för information angående kostnad.

zenti kaj propagandi la oficialigon kiel legitima rajto de fakta nacio.

Post la oficialigo nia ŝtato postulu aniĝon al U. N. La celado de U. N. kaj tiu de la esperanta movado principe koincidas, kaj jam de longe UEA estas aljunga al UNESCO. Aniĝo al U. N. estos sendube realigebla per speciala konvencio kun escepta aŭ aparta regularo. Nia lingvo estus rekonata plenrajta nacia lingvo. Estus neeble plu malatenti aŭ neglekti ĝian ekziston, ĝian faktan kaj naturan funkciadon en duobla rolo de nacia kaj tutmonda lingvo. En tiu situacio ni povus postuli ke ankaŭ esperanto estu labora lingvo en U. N. Tio estus jam konsiderinda konkero kun vaste-ga perspektivo.

La ekzisto de oficiala ŝtato. NACIO ESPERANA, aŭ alinoma, malfermus al nia afero preskaŭ novan mondon kun novaj kaj tute alispecaj eblecoj. Kaj kiel signo de espero pri komenco de epoko kun nova mondkoncepto nia florto super la mondo kiel oficiala standardo, kiel bela signo de kunlaboro, homeco kaj bona volo.

S. A. Jacobson

(Gesamideanoj kredeble memoros Kaĉjon, la belegan blankan katon, kies debuto esperanta okazis en n-ro 6 de *La Espero*. Artikoloj pri la afero aperis en la regionaj ĵurnaloj *South-end Standard* kaj *Evening Echo*, kun bildo de la kato kaj nia gazeto. Miriam Lion poste verkis por ni specialan, ekskluzivan artikolon, pri la reagoj de Kaĉjo mem.)

"Hu, jen, vidu, Kaĉjo, vi iĝis Kovrila Belulo", mi diris. "Tiu afabla sinjorino, kiu skribis al mi, aperigis vian portreton sur la kovrilpaĝo de *La Espero*."

"Tio ne surprizas min. Mi estas ne nur belega, sed interesa", komentis Kaĉjo trankvile. "Ĉu vi skribis denove pri miaj kvar premioj kiel Plej-Bona-en-la-Konkurso?"

"Ne, sed mi ja diris, ke vi estas multe tro malmodesta."

"Mi amas vin, sed vi fie mensogas. Mi aŭdis vin diri al tiu ĵurnalisto, ke vi ne aprobas, ke oni traktu katojn kiel infanojn."

"Mi ja ne aprobas."

"Do, kial vi donas al mi bifstekon kaj mem manĝas la kolbasojn?"

"Se mi havus infanojn, mi devigus ilin manĝi kolbasojn; do, vidu, mi ja traktas vin kiel katon."

"Kial vi ne informu ilin pri ĉiuj miaj interesaj faroj?" Kaĉjo sugestis. "Kiel, ekzemple, ke mi vizitas maljunulinojn, kaj ke homoj haltigas vin surstrate, por atentigi vin, ke pilĉardoj ĵus alvenis ĉe la fiŝvendiston? Ha, mi treege ŝatas bongustan pilĉardon!"

Kaĉjo helpas monokolektadon por bestprotektaj societoj. Kiel "fetiĉa besto" de la Katprotektita Ligo de la graflando Essex, li montras sin reklame sur iliaj afiŝoj. Li malfermis du el iliaj vendofestoj; li helpis min dum prelego pri katpurigado; kaj ĉe

iliaj festarangoj li permesis konkursojn konjekti pri lia aĝo, pezo kaj registrita nomo, tre profite al siaj senhejmaj kuzoj. Li aperis sur la estrado por Konservativuloj, Liberuloj (1), Cionistoj, Emerituloj, Ligo de Urbaninoj kaj Kunveno de Junaj Edzinoj, ricevis donacojn por la Katprotektita Ligo, kaj ĝuegis ĉiun momenton. Oni fotis lin multfoje por la gazetaro.

Li ricevas admiroŝtonojn kaj multajn vizitantojn, geamikojn, kun kiuj mi konatigis pro ilia intereso pri li aŭ miaj artikoloj pri li. En konkurso oni priskribis lin kiel La-Plej-Bonhumora-Kato-en-la-Konkurso. Li ĉiam ricevas ian premion, kvankam vintre liaj haroj emas elfali.

Li restas kiel li estas, dolĉa, drolita, komike sukcesebria, aranĝante sin en pozojn kiel Kavalirino Hamilton (2) por allogi atentigi. Vidante ĵuĝiston aŭ publikon, li tuj belmienas. Neniam enua, neniam laca, li kaj liaj premiokartoj plibonigadas dum la longa daŭro de la longa tago.

"Ĉu vi menciis, ke mi ne plu estas via solfilo?" Kaĉjo sugestis.

Mi antaŭtimis, ke Pliĵuna ĵaluzigos Kaĉjon, sed ili ludas unu kun la alia en plena sankta harmonio. La brilaj kuproloraj okuloj de Pliĵuna estas same belaj, kiel la famaj safiraj okuloj de Kaĉjo, sed li estas introvertito, kiu kaŝas sian vizaĝeton kontraŭ min kiam vizitantoj alvenas. Ne plaĉas al li ĵuĝistoj aŭ konkursoj; tamen li toleras ilin. Malsame al Kaĉjo kaj mi, li ne sekvas plurajn generaciojn de parademaj tipoj!

"Kiun mesaĝon vi volas diskonati tra la mondo pere de Esperanto?" mi demandis.

"Konsilu al ili, ke ili imitu min, kaj dividu kun aliaj siajn pilĉardojn kaj siajn litojn, kiel mi faras kun Pliĵuna, bonvole kaj ame. Neniam forgesu tiujn, kiuj estas solecaj. Iam mi estis Hipsa Kato — nun mi estas Gajoscia Kato."

Tradukis: Marjorie Boulton

- (1) Du britaj politikaj partioj, tre malsamcelaj.
- (2) Fama konkubino de la fama brita admiralo Horatio Nelson.

Om egennamn i Esperantoform

Transskription av egennamn till esperanto har sedan språkets tillkomst utgjort ett problem för sig. Doc. Ebbe Vilborg ger i sin recension av Plena Ilustrita Vortaro (La Espero nr 4/71) exempel på personnamn som Hitlero, Sopeno och i nr 1/72 påpekar S. A. J. att sådan transskription "gör ett besynnerligt intryck och ofta förbryllar". Han visar upp de verkliga skräckexemplen "Oskaro Vajldo" och "Katulo".

Jätteordboken PIV besparar oss monstret "Ajnstajno" för Einstein, men är "Sopeno" — med ett för originalet främmande S "med tak" — mindre horribelt? I Sverige, och säkert i de flesta länder, betraktas det som respektlöst och kränkande att stava en persons namn på annat sätt än bäraren själv gör. Saken kommer i ett annat läge, när ett namn skall återges med ett annat alfabet än originalspråkets, t. ex. kinesiska. Men jag föreställer mig, att såväl i Kina som Japan och Israel skrives namnen Einstein och Chopin med latinska bokstäver mitt i den kinesiska, resp. japanska och hebreiska texten.

Doc. Vilborg påpekar i sin artikel om PIV, att det alltid är försvarbart att återge egennamn i oförändrat skick. Och varför skulle inte esperanto i likhet med andra språk kunna inom parentes visa det ungefärliga uttalet av namnet? Vi svenska esperantister borde samfällt gå i spetsen för en sanering på detta område!

PIV skriver — så långt jag kunnat finna — konsekvent alla kvinnonamn med ändelsen -a, vilket är ett stort framsteg! Zamenhofs "Marta" och "Maria" är goda förebilder!

Betr. länders namn i esperanto har ännu efter 85 år ingen stabilitet uppnåtts! Samma land heter t. ex. än Svedujo, än Svedlando och än Svedio.

Zamenhof hävdar i sina Lingvaj Respondoj, att länder som grundats efter att en viss folkstam "utrotat alla innevägnare som tillhört andra stammar, eller låtit dessa leva i landet som främlingar" — dessa länder måste "ovillkorligen ha suffixet 'uj' för att vi skall kunna uttrycka skillnaden mellan folkstammen/världfolket och folkstammarna/främlingarna". Zamenhof framhåller namnet "Egiptujo" som mönster.

Drar man ut konsekvenserna av Zamenhofs motivering för suffixet -uj-, innebär det att vi esperantister skulle i länders namn konservera den

rashets och det främlingshat som resp. land en gång grundats på! Hur harmonierar detta med modernt tänkesätt om "De mänskliga rättigheterna" och om alla människors lika-berättigande?

Zamenhof väntar sig att "förr eller senare kommer den tid, då alla länder... får neutrala geografiska namn". Varför skulle inte världens esperantister vara de första att konsekvent bruka sådana? Vi har dem med suffixet -io (eller ännu bättre och mer internationellt: -ia)!

*

Ni ne povas kompreni kial esperantistoj, diskutante pri lingvaj problemoj rilate al Esperanto, uzas la svedan lingvon. En tiu ĉi kazo ni speciale bedaŭras, ĉar Gillis Staberg — kies vidpunktoj estas saĝaj kaj meritas atenton — malebligas al niaj eksterlandaj legantoj (i. a. al la ĉef-aŭtoro de PIV, kiun li kritikis) legi la tekston. Ni atentigis Staberg pri tio, kaj li respondis, ke "estus malĝuste, se lingve malpli spertaj personoj ne povus kompreni la enhavon de la artikolo, ĉar ankaŭ ili povas havi intereson pri la strukturo de Esperanto". — Ni absolute ne konsentas. Persono, kiu ne scias Esperanton sufiĉe por legi esperantan tekston, ne povas formi al si tian opinion pri la strukturo de la lingvo ke li povas diskuti pri lingvaj detalaĵoj de Esperanto. Aŭ ĉu Staberg opinias, ke nia lingvo havas tiajn mankojn, ke ĝi tute ne povas esti uzata por serioza diskutado?

La redaktoro

Kursoj en Jyväskylä

Enkadre de la Universitata somera programo, Somera Universitato, okazos la esperantokursoj elementa kaj daŭriga en 2—7.7.1972, kaj poste en 8.7.1972 la ekzamenoj baza kaj mezgrada. Instruistino estos s-ino Iva Åberg el Gotenburgo, Svedio. La kurskotizo estas 15:— fmk por unu kurso kaj 20:— fmk por la du kursoj. La ekzamena kotizo estas 5:— fmk. La kotizojn pagu al la kluba poŝtgirokonto.

Ni petas, ke vi sendu demandaĵn leterpoŝtkartojn, por pruvi ĝusta la neceson de la kursoj, al la sekretario de la Somera Universitato, la adr.: Magistro Paavo KUUSIMÄKI, Kesälukukauden kanslia, Jyväskylä Yliopisto, Seminaarinkatu 15, SF-401 00 Jyväskylä 10, Finnlando.

Esperanto-Klubo de Jyväskylä
PB 136

SF-401 01 Jyväskylä 10
Finnlando.

Poŝtgirokonto n:ro 180 86-5

KOMENTARIO AL LA KOMENTARIO PRI LA RADIOPROGRAMO

Unue mi demandas al mi, kion mi skribis por tiel inciti Kaj Stridell. Mi kredas, ke mi nur skribis kelkajn liniojn en nia gotenburga "Letero", kie mi dankis al tiuj personoj, kiuj en iu maniero esprimis sian opinion. Mi dankis en la nomo de la kvin knabinoj, samtempe ilin pro ilia peno.

Laŭ mi la programo estis bona, sed kompreneble mi neniam diris ke aliaj personoj ne povas fari pli bonan. Pri kelkaj faktoj vi tamen devas scii:

Kiam mi sukcesis akiri permeson fari la programon — kaj tio ne estis tro malfacile — la respondeca programvidantino donis al mi kelkajn regulojn laŭ kiuj ni laboru. La programo enhavu 10 minutojn da parolo kaj 20 minutojn da muziko. La programo estu farata de gejunuloj ĝis 16-jaraj por samaĝuloj.

Alia afero estas ke ni estas tiel malriĉaj je junulara muziko. Dum longa tempo mi klopodis havigi esperantajn diskojn, mi skribis al diversaj personoj, telefonis, i. a. al niaj junaj muzikistoj en Svängsta. Neniu povis helpi! Fine mi sukcesis havigi la diskon "Duo Espera" kiu enhavas sufiĉe modernan muzikon. Sed la knabinoj tre timis, ke ilia programo ŝajnus tro teda al aliaj gejunuloj. Tial ili demandis ĉu ili povos uzi diskojn sen kantado por vigligi sian programon.

Cetere ili — post kelkaj instrukcioj — faris sian programon tute memstare, ĉar mi opiniis, ke ili mem scias plej bone kiel kapti la intereson de iliaj samaĝuloj. Kaj Stridell ankaŭ diras, ke ili tro rapide parolas. Tion mi ne rimarkis, eble ĉar ankaŭ mi tiel parolas. Sed ĉu ne estis bone, ke knabinoj de la okcidenta marbordo faris la programon, ĉar orient-svedo dum la sama tempo eble sukcesus diri nur la duonon?

Kaj Stridell, mi ne ĉagreniĝas pro via kritiko, malgraŭ ke miaj junaj adeptoj iom malĝojas. Ili ne havas mian "dikan haŭton". Male, mi dankas al vi, ĉar tio donas okazon atentigi la esperantistojn pri kelkaj aferoj. Unue, kial vi ne skribis al Sveriges Radio? Ne por laŭdi la programon, sed por montri, ke oni observis ĝin kaj deziras pli da informoj pri Esperanto. Due, estas ĉe ni granda manko da moderna muziko, eĉ de muziko entute. Muziko estas tiel grava parto de la vivo de ĉiuj gejunuloj, ke ni devas serioze pritrakti idel solvi tiun problemon. Se via kritiko kaŭzos, ke la esperantistoj pli bone atentos tion, tiam ĝi ne estis vana!

Märtha Andreasson

Osvald Nicolaisen:

TRA AZIO

El Hindujo ni ricevis la jenan vojaĝraporton. S-ro Nicolaisen, iam Konstanta Kongresa Sekretario por la Universalaj Kongresoj, depost pluraj jaroj loĝanta en Stokholmo, faras vojaĝon ĉirkaŭ la mondon. Liaj impresoj pri la unua etapo estas interesaj kaj iom diferencas de tio kion ni ordinare legas kaj aŭdas.

Vojaĝi estas ĉiam granda plezuro, speciale se oni havas sufiĉe da tempo kaj mono. Sed oni povas ĝui la veturadon ankaŭ kun malmulte da mono.

Dum mia longa vojaĝo tra Finnlando, Sovet-Unio, Japanujo, Okinawa, Tajvano, Hong Kong, Bangkok, Malajzio, Singaporo kaj Cejlono, mi konatigis kun multaj homoj. Mi vidis la kutimojn kaj la hejmojn, kaj mi ĝuis la manĝaĵojn kaj la amikecon. Vojaĝante mi notis kelkajn okazintaĵojn kaj ricevis iom da impresoj en diversaj lokoj.

Tre scivola mi venis al Sovet-Unio. Tie mi spertis nur malagrablajojn. Mi skribis al kelkaj esperantistoj sed ne ricevis respondon. Kiam mi demandis homojn en la stratoj ili tuj foriris kiam ili rimarkis, ke mi estas fremdulo. Pluvigis dum la tuta tempo. Ĉe la landlimo la doganistoj konfiskis tri horloĝojn, kiujn mi havis je la brakoj. Ili estis por malriĉaj infanoj en Cejlono, sed la doganisto diris, ke estas kontrabando.

La vojaĝo per trajno tra Siberio, kiu daŭris sep tagnoktojn, estis teda kaj enuiga. Pluvo. Malvarmo ekstere kaj en la trajno. Neafablaj servistinoj. Ebriaj rusoj. Kriantaj infanoj.

La ŝipveturo de Haborovsk al Yokohama, kontraŭe, estis tre agrabla kaj ĝuinda.

Dum mia ses-semajna restado en Japanujo mi faris multajn prelegojn por pli ol mil personoj en esperantaj grupoj. Ĉie estas granda entuziasmo por nia lingvo inter la gejunuloj. La aktiveco de la kluboj estas tre granda. Mi loĝis plejparte en la hejmoj ĉe esperantistoj. Sidis sur la planko ĉe la malaltaj tabloj kaj manĝis rizon per bastonetoj, kaj dormis sur "tatamio" sur la planko. Kun la rizo oni ofte manĝis i. a. maran herbon, krudan fiŝon kaj krudan ovon.

De Kagosima, Japanujo, mi veturis per ŝipo al Okinawa kaj de tie al Tajvano. Estis ŝtormo kaj malfacile dormi sur la "tatamio" kune kun multaj aliaj. Oni glitis tien kaj reen. Inter Tajvano kaj Hong Kong estis bona ŝipo.

Mi veturis per trajno de Bangkok al Singaporo kaj haltis dumvoje por

du semajnoj en la bela banloko Penang en Malajzio. La naturo de la insulo multe similas al Cejlono.

Jes, Cejlono estas vere bela, agrabla kaj varma insulo kun multaj tre bonaj banlokoj. Blanka sablo. Varma marakvo. Grandaj ondoj. Palmoj svingantaj pro la agrabla venteto de la maro. Sed la medalo havas ankaŭ dorsan flankon. Malriĉeco, senlaboruloj, almozetantoj, moskitoj. Mankas multaj ĉiutagaj objektoj kaj manĝaĵoj, kiujn turistoj opinias necesaj.

Pro la favora monŝanĝo (kaj ankaŭ la libera merkato) oni povas vivi tre malkare en Cejlono. Troviĝas sufiĉe bonaj hoteloj kaj mi pagis nur egalvaloron de sv. krj 1:50 por trankvilito kaj 2:50 por tagmanĝo.

Post pli ol du-monata agrabla restado en Cejlono mi veturis per ŝipo al Hindujo. La ŝipo estis plenplena de TAMIL-familioj. Ili estas hinda popolo, kiu devas forlasi Cejlonon kaj reveturi al sia pli frua hejmlando. Multaj ploris ĉar ili devis forlasi sian hejmon en Cejlono.

La cejlona registaro (singalesa) volas limigi la instruadon de la angla kaj tamila lingvoj en la lernejoj. Ili volas enkonduki la religion de Buddo kiel ŝtatan religion. Do, vere marŝado malantaŭen.

MUNDO — NOVA INFORMILO

S-ro Oskar Svantesson en Gotenburgo kunigis siajn du cirkulerojn, Letero kaj Edukado, en unu novan MUNDO. Mundo traktas precipe lokajn, instruistajn kaj pacajn aferojn.

Por la esperantistoj en tuta okcidenta Svedujo la stencilitaj cirkuleroj de Svantesson estas gravaj informiloj. La nun mortinta Letero donis rapidajn informojn pri okazintaĵoj en la regiono kaj ofte enhavis interesajn ideojn kaj debatojn. Ni esperas, ke longe kaj vigle vivu kaj la nova MUNDO kaj ĝia eldonanto.

Adreso: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 421 74 Västra Frölunda. Prezo por 10 sinsekvaj numeroj: 7 svedaj kronoj.

DANSK ESPERANTOFORLAG

Aperis katalogo de Dansk Esperanto-Førlag, prezentante preskaŭ 40-on el la eldonaĵoj de tiu vigla eldonejo. Multaj el ili estas jam recenzitaj en La Espero, aliaj estos. La eldonisto, s-ro Friis, meritas ĉian apogon en sia laboro, tiel grava por la tutmonda esperantistaro. La plej efika apogo estas kompreneble aĉeto de la libroj. La katalogo estas havebla ĉe Dansk Esperanto-Førlag, Ingemannsvej 9, DK 8230 Åbyhøj, Danlando.

KIEL TRADUKI "SLIPA"?

Facile, vi kredas, kaj tuj pensas pri "akrigi". En la vortaro Jansson—Lindén—Gerdman troviĝas krome "face-ti" kaj "frotumi".

Sed por korekte esprimi "slipa" por atingi ekzaktan dimension neniu el tiuj vortoj taŭgas, laŭ mia opinio. En tiu senco la vorto "slipa" celas laboroperacion, kiu en la moderna maŝinindustrio estas ege grava kaj ampleksa (planslipning, rundslipning, hålslipning). Mi laboras en la plej granda industrio de Svedujo por fabrikado de specialaj maŝinoj por tiu kampo, kaj ĝia plej konata produkto, eksportata al ĉiuj gravaj industriaj landoj en la tuta mondo, nomiĝas angle "centerless grinding machine", germane "spitzenlos Rundschleifmaschine", france "rectifieuse sans centre" ktp. Kiam alvenis el iu lando letero en Esperanto — instigita de la agado de s-ro Carlén — mi staris antaŭ la problemoj kiel traduki en Esperanton la nomon de la ĉefa produkto de la entrepreno. Mi solvis provizore la problemon, sed poste turnis min al s-ro K.-J. Moberg en Stokholmo, kaj kun lia afabla permeso mi citas el letero antaŭ ne longe ricevita de li:

Estas tiel ke mi iam kaj tiam korespondas kun la estro de T. C. (Terminars Centro) de I.S.A.E., ing. A. Broise — En 1920aj jaroj ni vigle korespondis pri teknikaj terminoj, sed nuntempe fariĝas pli malofte — En la lasta letero mi kaptis la okazon demandi lin pri via "slip"demando, ĉu li hazarde scias ion pri ĝi.

Jen lia respondo. Mi citas: "Jam ekde 2 tagoj mi relegas la teknikajn kaj meĥanikajn terminojn de PIV, esperante trovi la solvon petitan fare de S-o Ake Blomberg, sed vane. Mi bone konas la terminojn anglan "centerless grinding machine"; francan "rectifieuse centerless"; germanan "Zenterlesschleifmaschine". Post diskuto kun kunlaborantoj de Il-maŝina Terminaro (antaŭ apero de PIV) mi elektis: sencentra erodmaŝino aŭ, pro internacieco, "centerless-erodmaŝino".

Se erodi ne plaĉas, ekzistas poluri netfroti froti elfroti eluzi, kaj, nur unufoje uzita, ŝlifi sed pro A grind mi opinias ke erodi pli konvenas."

Laŭ s-ro Broise "erodi" kaj "erodmaŝino" estu plej konvena, sed por modifo oni ankaŭ povas uzi la ĉi supre cititajn vortojn por "froti". La vorto "centerless" ne troviĝas en PIV, sed ĝi ja troviĝas en A, F kaj G. Eble ĝi povas en E esti anstataŭata per "sencentra".

Evidente mankas en Esperanto la ĝusta teknika vorto — aŭ almenaŭ interkonsento pri ĝi. Ĉar la vorto rilatas al la ĉiutaga laboro de pluraj el niaj legantoj mi permesas al mi atentigi pri la manko!

Ake Blomberg

GRAVA ATENTIGO

La sekvonta numero de La Espero aperos en aŭgusto. Grandparte ĝi estos finredaktita antaŭ julio. La ĉefredaktoro estos forvojaĝinta de la 25-a julio ĝis la fino de aŭgusto.

Materialon por la sekvonta numero bonvolu sendi al ni antaŭ la 15-a de junio. Mallongajn aktualajn informojn ni povas akcepti ĝis la 1-a de aŭgusto, sed bonvolu tiajn ne sendi al Ake Blomberg sed al Sune Ahlm, Sandbergs väg 14, 460 60 Vargön, kiu faros la finredaktadon.

NOVA SERVO SERĈAS KUNLABORANTOJN

La plej nova servo starigita de Universala Esperanto-Asocio — ĉi foje en kunlaboro kun Internacia Scienca Asocio Esperantista — petas helpojn kaj daŭran kunlaboron de interesitaj personoj. Temas pri la Scienca Tradukservo, kiu celas disponigi Esperantajn tradukojn de gravaj nacilingvaj sciencaj artikoloj kaj tiamaniere trarompi la lingvajn barojn, kiuj obstaklas la racian progreson de la scienco. Antaŭ ol tia servo povas plane ekfunkcii, ĝi devas starigi sliparon pri jam ekzistantaj tradukoj kaj pri personoj pretaj kaj kapablaj fari novajn tradukojn laŭpete. S-ro André Heck, la administranto de la Scienca Tradukservo de UEA, alvokas ĉiujn personojn, kiuj konas sciencajn artikolojn jam tradukitajn en Esperanton, sciigi al li la kompletajn bibliografiajn detalojn kaj samtempe invitas ĉiujn, kiuj pretus kunlabori en la tradukado, anonci al li siajn nomojn, adreson, lingvoscion, sciencajn kvalifikojn ktp. Lia adreso: rue de Chéra 49, B-4000 Liège, Belgujo.

HELSINGÖR 1972

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos en La Internacia Altlernejo de Helsingör (tute moderna) dum la semajno 23—30 de julio (tuj antaŭ Frostavallen). Venu por ĝui vere interesan ferio-semajnon inter samideanoj el multaj landoj!

Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando

SETÄLA 80-JARA!

Vilho Setälä, la konata finlanda esperantisto, fariĝis 80-jara en aprilo. Granda artikolo aperis en i. a. Hufvudstadsbladet. Ni ne bezonas tie ĉi fari resumon pri lia multjara agado por Esperanto — precipe en la lingva kampo (li estas membro de la Akademio) — ĝin bone konas la esperantistaro. Ni nur postfeste gratulas, dezirante al s-ro Setälä ankoraŭ multajn aktivajn jarojn.

POSTKONGRESO DE TEJO EN GDANSK LA 22—25 VII 1972

Tuj post la Kongreso de TEJO en Torun — Pollando okazos en Gdansk Postkongresa Seminario dediĉita al la Temo "Balta Maro — Maro de Paco". La programo entenas ĉiu tage aŭtutage diskutojn sur bazo de traigitaj referaĵoj je la temo "Balta Maro — Maro de Paco". Posttagmeze kaj vespere okazos tre riĉaj kulturaj kaj turismaj programoj.

Aligilojn oni akceptas ĝis la 30-a de majo. Informas: Jadwiga Greger, Sopot — Pollando, str. Kujawska 24.



KORESPONDI DEZIRAS BULGARIO

Operkantistino Maria Angelova, Sofio 19 Prohlada 26 (partoprenis en kantvesperoj en Vieno kaj Londono) petas adresojn de korespondemuloj.

Brevmärke - Portland

Hjälp till göra reklam för världskongressen i Portland genom att på all post sätta det vackra brevmärket i tre färger. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:40

3 kartor kr. 3:—

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

FERIO KUN SENCO

Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu semajnon (22.7—29.7 1972) en la feria centro KOSMOS en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i. a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94—96, DK 2000 Kopenhago F., Danlando.

SVEDA VIZITANTO

S-ro Ake Ahlrén el Vällingby en Svedujo vizitis Nederlando en la lasta semajno de majo. S-ro Ahlrén, aktiva membro de KELI, laboras por granda firmo, kiu vendas por kontroli kaj difini la kvaliton de papero. Tial li ofte vojaĝas. En la pasinta vintro li vizitis Ĉeĥoslovakujon, precipe la urbojn Praha kaj Brno. Tie li konatiĝis kun diversaj esperantistoj kaj faris interesajn diapozitivojn.

Merkredon la 27-an li montris 80 da ili al grupo de hagaraj esperantistoj, kunveninta en Una Sancta, la kunvenejo de Mara Stelo. Sur la bildoj ili vidis landon kun interesaj urboj, tipa folkloro kaj rava naturo.

La parolanto ege laŭdis la ĉeĥajn homojn. La vivokostoj estas malpli altaj ol en okcident-Eŭropo.

Ceestis ankaŭ du anglaj sinjorinoj, el kiuj unu interese rakontis pri strangaj okazintaĵoj dum siaj vojaĝoj kiel esperantistino.

La kunveno estis vera sukceso.

Nia sveda amiko vojaĝis post streĉa taga laboro de Amsterdam al Hago kaj returne kaj faris ĉion nur por servi la esperantan movadon. Laŭdinda ago precipe se oni konsideras, kiom da esperantistoj ne forlasas komfortan seĝon por viziti bonan kunvenon, se ili nur trovas iel ian ajn pretekston por kvietigi la facile kvietigeblan konsciencon. Ĉiuj vojaĝantaj esperantistoj ĉiam preparu sin por kontribui al la esperanta afero eksterlande. Oni kunprenu materialon kian ajn pri sia lando, sed precipe oni zorge preparu sian dirotajn. Oni pripensu kaj notu, kion oni volas kaj povas diri, oni serĉu la bezonatajn vortojn kaj esprimojn kaj konsideru, ĉu la enhavo estos interesa kaj taŭga por la eventuala publiko. Ĉiam pli oni vojaĝas, feliĉe, sed ankaŭ Esperanto profitu de viaj vojaĝoj! Certe ne estos malprofito por vi mem.

W. Krikke

En direktansluten medlem (RM) har den 27 mars satt in medlemsavgiften på postgirokonto 20 12-3 utan att ange sitt namn. Var god skicka oss postens kvitto med namn och adress.

SEF

NI FUNEBRAS

RIGMOR kaj CARL A. KLANG
Alnarp, Åkarp

Ambaŭ pereis la 14-an de marto ĉe la terura aviadila katastrofo apud Dubai, La Persa Golfo, survoje hejmen de Cejlono. Kaj ambaŭ estis depost pli ol 30 jaroj membroj de Klubo Esperantista de Malmö. Carl Klang, kiu fariĝis esperantisto en Arlöv jam en 1931, ege multe vojaĝis kaj sciis en talenta kaj humora maniero rakonti pri siaj bonaj bildoj antaŭ societoj en Svedujo kaj Danujo. Alia temo estis pri floroj kaj fruktoj en Alnarp, kie presitaj, oficialaj raportoj en pluraj jaroj ricevis resumojn en Esperanto. Ili ripozu en paco. **Str.**

★

Mortis en Aŭstralio s-ro **C. C. Goldsmith**, dum multaj jaroj — precipe dum la dua mondmilito — ĝenerala sekretario de la tiam Internacia Esperanto-Ligo. Li aktive laboris por Esperanto dum sia tuta vivo kaj estis je sia morto — 82 jara — ankoraŭ tre energia sekretario de Aŭstralia Esperanto-Asocio.

★

La tradukinto de svedaj anekdotoj **Axel A. Helm mortis, 78-jara**. Li kolektis anekdotojn kaj eldonis la bonilustritan libron "Bona rido", kiun vendas Eldona Societo. Helm estis unu el la fondintoj de nia klubo, HEK. Li estis estrara membro.

Dum la SEF-kongreso en Örebro li persone transdonis belegan prezidanto-martelon, kiun li propramane slojdis el lignopecoj de ĉiuj kvin kontinentoj.

Li ripozu en paco!

Soso

SINJORINO SZILAGYI FORPISIS



Ne multajn jarojn post la forpaso de sia edzo, Ferenc, Rose Szilagyi sekvis lin.

Gesinjoroj Szilagyi venis al Svedlando en la jaro 1932. D-ro Szilagyi gvidis Esperanto-kursojn laŭ propra metodo, en diversaj svedaj urboj, kaj lia Rozeto fidele sekvis lin ĉiuloken. Depost 1943 ili definitive ekloĝis en Borås, kie sinjorino Szilagyi sindone helpis sian edzon en la teknika redaktado de "Norda Prismo". En 1953 ili iĝis svedaj civitanoj.

Francisko estis unuavice poeto, verkisto, romantikulo. Ankaŭ samideanino Rozeto estis idealisto, sed plejparte praktikulino, kun ambaŭ piedoj sur la proza tero. Lerta mast-rumantino, kiu efektive prizorgis la edzan nutradon kaj aranĝon de harmonia hejmo por la kunvivulo ŝvebanta en superteraj sferoj de la poezia mondo.

Rozeto per sia milda naturo gajnis la korojn de multaj geamikoj, en kies memoro ŝi longerestos kiel hele verdluma, hejma gardaĝelo. **T. M.**

Konstrui per

YTONG[®]

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

57-a
UNIVERSALA KONGRESO
de Esperanto



29 juli—5 augusti 1972

PORTLAND (Oregon) USA

blir platsen för esperantovärldskongressen 1972. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller USA.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	<i>Till 20/6 1972</i>	<i>Efter 20/6 1972</i>
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	180: —	218: —
2. Kongresano, individua rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	158: —	195: —
3. Kongresano, individua rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	135: —	173: —
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	126: —	164: —
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	111: —	148: —
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	54: —	92: —
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	90: —	128: —
8. Blindul(in)o	72: —	110: —

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vdarebefordrar gåvor till **Litteraturfonden** (tävlingspremier), **Blindfonden** (de blindas kongress), **Adopta Kaso** (för dem som ej kan betala från eget land) och **Adoptaj Gepatroj** (för barnkongressen). Givares namn publiceras. **Svenskarna** bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen.

Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv. kr. (postĉeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180: —, 1/2 = 90: —, 1/3 = 60: —, 1/6 = 30: —, 1/12 = 15: —.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanenco: 25-vorta = 4: —, 50-vorta = 8: —.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströenne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 6. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasisto: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Bertil Akerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postĝiro 578-5.



Administranto: Anna-Greta Ströenne

Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78